

La nomo de Ernest Naville estos donita al domo de
Gastejo Edmond Privat
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1978 novembro 16, 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Antaŭ ekzakte 10 jaroj estis fondita sub la nomo Kultura Centro Esperantista asocio, kies celo estas la iom post ioma starigo de feria altlernejo. Dank' al la komprenemo de la aŭtoritatoj de la urbo La Chaux-de-Fonds kaj kantono Neuchâtel, tiu ĉi Kultura Centro Esperantista instaligis en somero 1974 en la urbo ĵus menciita. Du jarojn poste estis kreita fondumo, kies tasko estas la rikoltado de kapitalo, kiu permesos aĉeti kaj transformi domojn, por ke la kursoj de Internacia Feria Altlernejo povu disvolviĝi en favoraj kondiĉoj. Kaj la 5-an de septembro la fondumo, kiu ricevis la nomon Gastejo Edmond Privat povis jam akiri du domojn. Okaze de kultura semajnfino disvolviĝonta la 2-an kaj 3-an de decembro tiuj ĉi du kvinloĝejaj domoj ricevos la nomojn de du pioniroj de esperanto, tio estas de Ernest Naville kaj Pierre Bovet.

A.- Estas la okazo diri kelkajn vortojn pri tiuj ĉi personecoj, kiujn fakte bone konis ne nur la esperantistaro, sed tre vasta publiko. Kiel vi konstatos, Ernest Naville estas la patro de la proporcia voĉdonsistemo kaj Pierre Bovet tiu de la aktiva pedagogio.

Cl.- Ni hodiaŭ komencas prelegserion pri Ernest Naville, la patro de la proporcia voĉdonsistemo kaj la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo.

A.- La infaneco de Ernest Naville estis tre feliĉa kaj harmonia. Naskiĝinta la 13-an de decembro 1816 en Chancy, vilaĝeto apud Ĝenevo, kie lia patro estis pastoro de la protestanta paroko, Ernest Naville fakte kreskis en alia vilaĝo nomata Vernier, situanta borde de la rivero Rodano je kvin kilometroj de la urbo Ĝenevo. En tiu vilaĝo Vernier, la patro de Ernest Naville aĉetis bienon kun grandsinjora domo por starigi edukpensionon. Jam du jarojn post la naskiĝo de Ernest Naville, François Naville ekŝiĝis el sia pastora funkcio por sin dediĉi al sia eduka tasko. Li estis amiko de la svisaj edukistoj Heinrich Pestalozzi kaj pastro Girard, kiuj alportis veran revolucion en pedagogion. En 1818 Heinrich Pestalozzi okupiĝas pri georfoj en la urbo Yverdon kaj pastro Girard, planadas la eduk sistemon en la urbo Friburgo. François Naville iris observi ilian laboron kaj inspiriĝis de iliaj eduk-sistemoj.

François Naville havis tre altan idealon. El siaj gefiloj kaj el la infanoj, kiujn li havis en sia pensiono, li volis fari homojn ne nur kapablajn harmonie plenumi sian devon en tiu ĉi mondo, sed ankaŭ preparitajn al la eterna transmonda vivo, kiu por li estis la vera destino de la homoj. Li ellaboris studoplanon, kiu celadis plenajn korpan kaj mensan disvolviĝojn de liaj edukatoj. Tiu studoplano antaŭvidis korpajn ekzercojn: gimnastikadon, naĝadon en la rivero Rodano, ekskursadon en la najbaraj regionoj. Aliaj ekzercoj celadis la akrigon de la vidpercepto: observado de la naturo. Tria speco de ekzercoj rilatis al la aliaj sentoj kaj provis disvolvi la juĝokapablon. Fine la artoj, inter ili desegnado kaj muziko, okupis grandan lokon en tiu instruplano.

La instituto de François Naville havis organizon sub formo de konstitucia monarkio. Konsilantaro elektita de la gelernantoj okupiĝis pri la interna vivo, organizaj problemoj kaj eĉ decidis la punojn, tio sub la kontrolo de François Naville mem.

Kion François Naville volis eviti, tio estis la konkuremo inter la gelernantoj. Konkuro vekas rivalecon. Li opiniis, ke ĉiu devas nur kompari sin al si mem. Pro tio la instrufakoj estis sendependaj unu de la aliaj kaj la instruado estis individua. Oni povis vidi lernanton, kiu estas en unu klaso por studi la francan lingvon kaj tute alia klaso por la studo de alia fako: geografio, historio, latina lingvo, matematiko, ktp...

En tiu edukejo la aktivecoj estis efektivigitaj plejeble ekstere, kiam la vetero tion permesis. Ĉiuj tiuj faktoj atestas, ke François Naville estas unu el la patroj de la moderna instruado.

Sed François Naville, kiel ni jam vidis, volis pretigi siajn gelernantojn ne nur por la vivo en tiu ĉi mondo, sed ankaŭ por la transmonda vivo. Li mem okupiĝis pri la religia instruado kaj ĉiutage li gvidadis diservon, kiu grupigis la tutan domon: la gelernantojn, la geinstruistojn kaj la geservistojn. En la instituto de François Naville ĉiuj agoj de la vivo devis esti influataj de religia sento. La tuta vivo de Ernest Naville estis markita de tiu kristana edukado.

SinJORINO Adrienne Naville-Arnold, la patrino de Ernest Naville, ne nur okupigis pri la edukado de siaj gefiloj. Ŝi samtempe estradis la servistaron de tiu lernejo, kiu grupigis pli ol cent gelernantojn.

En tiu instituto Ernest Naville travivis tre feliĉan infanecon. Liaj talentoj povis disvolviĝi en kontakto kun multaj gefratoj kaj gekamaradoj. Malgraŭ la ekstera vivo kaj la korpaj ekzercoj, Ernest Naville fizike ne iĝis tre fortika. Tre frue oni rimarkis, ke li estis sufiĉe talenta en la beletraj fakoj. Tamen li ricevis manlaboran instruadon, kaj la tutan vivon li ŝatis ripozi de la intelekta laboro per lignaĵista laboro kaj ĝardenado.

François Naville partoprenis konkurson pri instrumentodoj, kiu estis proponita en 1828 de la Pariza societo pri instrumentodoj, kaj li gajnis premion en 1829. Lia konkursa laboro estis poste publikigita sub formo de eseoj: 1831: traktato pri publika edukado; 1836: pri la leĝa karito. Tiuj eseoj famigis François Naville en la edukaj medioj, kaj la vizitantoj alfluadis en lian edukinstituton en Vernier apud Ĝenevo. Fine François Naville publikigis memuaron pri la popola edukado por la svisa societo: "Société d'utilité publique helvétique". Kun Heinrich Pestalozzi kaj pastro Girard, François Naville estis unu el la plej famaj svissaj edukistoj de la 19-a jarcento.

Vi aŭdis prelegon el Svivlando pri la infaneco de la ĝeneva filozofo Ernest Naville, la unua honora prezidanto de Svisa Esperanto-Societo. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!